



julio - 1997 - N° 18-a


ASTURIO

## ENHAVO

- 2..Nia Urbo
- 3..Arkano
- 4...La "Nuberu"
- 5...La najtingalo kaj la pasero
- 6-7Bezono de la Internacia Lingvo tra la Historio
- 8...Printempa
- 9...Mesaĝoj
- 10.Ĉiuj la vojoj kondukas al Romo
- 11.La sunviro kaj la lunviro
- 12.Katido
- 13.Ĝan - Arkaj
- 14.Ĉu vi havas bonan karakteron?
- 15.Amuzaĵoj
- 16.K.A.E. Informilo



**REVUO DE LA AVILESA  
ESPERANTO - GRUPO**



# NIA URBO

VOJPLANOJ (Daŭrigo)

Estas tre agrabla por ni ekaperi al la avilesa enfluejo, paŝi antaŭen sur la vojo kaj alveni al la fiŝborso, kie ni povas ĝui mirindan spektaklon: tiu de aukcio de fiŝoj, kiuj ĉiutage, vespere, alvenas al la haveno.

Ni ankaŭ ne devus perdi pitoreskan medion de la lunda halo; kiu okazas en la "Provianta vendejo" aŭ la viziton al tiu ĉi loko en iu ajn tago de la semajno je matenaj horoj.

Kaj por tiu, kiu ĝuus admiri ampleksajn panoramojn li povas kontempli tiujn, kiuj ekde la "Ermitejo de la Lumo"-en la kvartalo de la mem nomo- vidatingas la tutan urbon de Avilés, ĝian enfluejon kaj la maron; aŭ tiuj kiuj permesas vidi "Salinas" kaj la maron ekde la belvidejoj de la "Garita" kaj la "Peña" en la proksima paroĥo de Sankto Kristobol de "Entreviñas" kaj ankaŭ alia malsama perspektivo de la ferindustrio (C S I) ekde la mem preĝejo de Sankto Kristobol.

Estraro de ANTAŬEN

\* \* \* \* \*

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino: M<sup>a</sup> Luisa Menéndez

Kasisto: Celestino Fernández

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

M<sup>a</sup> José Alvarez Faedo

Luis González

David Menéndez

Eva González

\* \* \* \* \*

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILES (Asturias)

Tfn°.- 98-554 11 27

Subvenciita per la Registraro de la Avilesa Municipo.

Depósito legal n° As. 1398 (9)

La Redakcio (Daŭrigos)

# ARKANO

La homa koro estas pli sincera  
kiam ĝi sentas doloron,  
kiam sentas nostalgion pri karesoj  
kaj amaj paroloj



Ne ŝajnigas la koro, en malfeliĉo  
aŭ en soleco,  
lerni en silento de l' vivo  
la senplaĉan realecon.

Koro, koro, kiam vi priploras  
perditan idealon  
sentas grandan mildigon en cia doloro  
rakontante ĉian suferon.  
Kial vi ne estas sama kiam ridas  
orgojle kaj triunfe?




Ĉu ci ne komprenas, hazarde  
en tiuj plezurigaj kaj amaj horoj,  
ke la tagoj, kiuj mankas al la vivo  
povus esti el doloro?

Se la estonto ne estas certa, se ci ne scias  
la profundan sekreton de l' horoj  
kial ci ne sinceras dumride  
same kiel dumploure?



Koro, koro estu ĉiam bona,  
kiam ploras aŭ ridas  
ĉar la nuno estas efimera kaj ci ne  
scias  
kio, alitage, postveni povas.

# LA "NUBERU"



La "Nuberu" estas tre grava mita persono apartenanta al la astura tradicia mitologio. Li estas la direktora genio de la fulmotondroj. kaj perversa estaĵulo kiu kaŭzas grandajn ruinojn en la kampoj, kiam li kolizias la tondrojn kaj malŝargas trombojn el akvo kaj hajlo sur ili, kvankam, laŭokaze, li kondukas bone tiuj, kiuj helpas lin kiam li descendas al la tero. Li estas preskaŭ nigra, malbonaspekta monstro; de alta staturo, larĝaj dorsoj, muskolaj brakoj kaj kolosa forto. La "Nuberu" vestas felajn kostumojn, nigran ĉapelon de larĝaj ĉifonaĵoj kaj grandajn barbojn. Li veturas rajdante sur la nuboj. Li nomiĝas "Juan Cabrito" kaj loĝas kune kun sia edzino kaj siaj gefiloj, ĉe domo sur la kulmino el monto kovrita el nebulo, en Egipto.

La ĉefa aktiveco de la "Nuberu" estas veturi rapide en la nebulo kaj la nuboj; fine li malŝargas fulmotondrojn el hajladoj sur la ejoj kiuj plaĉas lin, se la ekzorcoj el la kamparanoj ne malebligas lin. La pli bona maniero por ekzorci al la "Nuberu" konsistas :eksonu sonoriloj de la preĝejoj .

LA NAJTINGALO  
KAJ  
LA PASERO

Najtingalo aŭskultis gurdon kaj ricevis ĝiajn lecionojn. Iun tagon alvenis iu ajn pasero al lia kaĝo kaj diris tiel:

-Kiel mirinde estas vidi spertan birdon, kiel vi, lerni de via lernanto! La pasero daŭrigis: -Mi pensas, ke tion kion la gurdo scias, ĝi tute scias dank' al vi.

La najtingalo respondis: Antaŭe ĝi lernis ĉe mi, nun mi sanĝiĝas por aŭskulti de ĝiaj kantoj. Kiel ĝi instruas kun vera arto, baldaŭ vi povos konstati la progreson de najtingalo, kiu kun digno kantas.

Ĉu la fama literatoro ofendiĝas lerni? Do, ju pli oni scias des pli oni devas lerni. Por ke neniu opiniu scii tion, ke li jam ne devas lerni.



Daisi Murillo  
(Lernantino de duakurso)



## BEZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO (Daŭrigo)

### II

*Saman aŭ tre similan funkcion ankaŭ havis, je iu-aj historiaj epokoj, aliaj lingvoj: la Araba lingvo, je la periodo de prosperado de la Araba kulturo je la Mezepoko, kaj, hodiaŭ, en la formo de literatura lingvo, kiel kultura kaj politika ligilo de la popoloj kiuj parolas malsamajn Arabajn dialektojn; la Turka lingvo, kiu post la militistaj konkeroj de la Sublima Pordo enmetigis profunde en Eŭropo kaj lasis multajn postsignojn, precipe en la Balkanaj lingvoj; la Hispana, Portugala, Angla kaj Franca, kiu disvastiĝis je la kolonia epoko kaj post aliaj konkeroj, kun la rezultato de ke nuntempe ili estas oficialaj lingvoj de sendependaj ŝtatoj; la Rusa lingvo, ne nur sub la caroj, sed ankaŭ en Sovetio, kaj nun, en la diversaj ŝtatoj; al tutaj ĉi-tiaj lingvoj, oni aldonas la Germanan, Italian, Holandan kaj aliajn literaturajn lingvojn el diversaj teritorioj.*

*Je tutaj ĉi-tiaj ekzemploj, la menciitaj lingvoj ricevis aŭ ricevas la apogon de definitiva politika forto, bazita, ĝenerale, sur la kruda militista povo, sed ankaŭ ligita al la ekonomika dinamismo kaj al la kultura disvastigado. La fakto de que malsamtrunkaj lingvoj akiris kaj perdis, tra la historio, tiam privilegian pozicion, klare montras ke ilia interna strukturo, ĝi mem, havis nenian decidigan signifon en ĉi-tiu proceso. Principe, iu-ajn lingvo povis juĝi tiun rolon aŭ esti adaptita, kun relativa rapido, por plenumigi ĝin kiel ĝin pruvas la nuna disvolviĝo de oficialaj lingvoj en multaj novaj ŝtatoj, kiel, ekzemple, Izraelo aŭ Indonezio.*





# PRINTEMPO




Lumo, eksplodo el lumo. Oni flamiĝas la koloroj de la vespero sur la verda pejzaĝo surŝpricigita per lilioj kaj papavetoj. Lumo, eksplodo el lumo mallibera en via rigardo, kiu vundas miajn okulojn kaj incendias mian animon.

Sur la verda kamparo, sur la verda herbo preplantigita kaj suka, via flora korpo. Estas printempo. En via lipoj oni desegnas promeson de neprononcebla eterneco. Alveni al vi, eksplodi vian internon, fandiĝi min kun via lumo, ascendi al la lumo. Estas printempo, eksplodo el koloro, ruĝa sur verda kaj blua kiel fundo, ĉiela blua, blua en via blua rigardo. Fuĝpunkto. Interne ni la laberinto.

Ruliĝi ni tra kamparo por atingi la riveron. La ŝaŭmo de la akvo malliberigas vian lumon. Via korpo, poliedro en la ŝaŭmeroj, banas mian vizaĝon kaj lekas miajn vundojn. Via haŭto estas rivero fluante tra miaj venoj. Ruĝa rivero, varmeta sunkrepusko, kristala rebrilo, vidu nin proksime, la akvo apudas nin, ni estas akvo, fluo. Kaj ankaŭ ni estas printempo. Ni bruligu la horojn. Ĉesigi la tempon estas atingi la eternecon, eterna momento en niaj avidaj manoj kiuj abundegas karesemon, plenecon.

Kiam la nokto alvenos, la luno pruntedonos al ni luman veston. Ni estos lampiroj en la nokto. Griloj kaj cikadoj tonkantos aman kanton por ni, omaĝo al la lumo de niaj korpoj, al la profundeco de nia haŭto. Festilumaj vojetoj trasulkos la herbaron kaj faros paliĝi la plelunon. Spuroj en la nokto. Hodiaŭ ni estas la lumo kaj hodiaŭ ni estas la vojo. Hodiaŭ ni estas la printempo. Interne ni la laberinto.





## MESAĜOJ

Ni, ĉiuj, tre feliĉas legante la diversajn revuojn, kiujn ni ricevis. Ili transdonas al niaj spiritoj grandan kontentecon. La Esperanto tre bone funkcias!

-0-0-0-0-0-

Ĉiuj membroj de nia grupo jam aliĝis por partopreni en la tre interesaj kongresoj (7-a Internacia Esperanto kongreso; 7-a Europo Esperanto Forumo kaj 56-a Hispana Esperanto Kongreso) kiuj okazos, ĉi monate en Valencio. Pretigas tiujn-ĉi gravajn eventojn la plej kapablaj kaj inteligentaj hispanaj geesperantistoj.

-0-0-0-0-0-

Daisi Murillo Zaballa, lernantino de niaj kursoj esperantigis por la nuntempa revuo delikata dialogo kiu movas al la pripenso.-Ĝi estas interpretita per du birdoj, najtingalo kaj pasero.

-0-0-0-0-0-

Ni ricevis tre gravan kaj interesan broŝuron-PRO ESPERANTO-eldonita en hispana lingvo per la H E F. Ĝi estos tre utila por diskonigi la esperntan movadon inter journalistoj, universitatanoj-kaj aliaj hispanaparolantoj .

-0-0-0-0-0-

### KORESPONDI DEZIRAS:


Maria Isabel Murillo Zaballa .- kun geesperntistoj de la t.m. pri ĉiuj temoj.  
Adreso : c/ Palacio Valdés 34.-2°.-A 33401 AVILES.- España.-

Gene Alvarez García.- Kun gesamideanoj el diversaj landoj pri ĉiuj temoj  
Adreso: c/ Valdés Salas 5.-B.-4° lz.

María Luisa Ejarque Alvarez, filino de Gene, 12 jara kun geinfanoj de la t.m.  
pri infanaj temoj

# ĈIUJ LA VOJOJ KONDUKAS AL ROMO

Tiel diras proverbo. Finfine ni iris tien. Ne eblas diri, kio plej multe impresis nin. Ĉu estis Kastelo de Sankta Anĝelo, kiun ni kiel opero-ŝantantoj nepre devis viziti? Estis ege impresa travivaĵo, stari sur la tegmento de la kastelo. La spirito de *Tosca* kaj *Cavaradossi* ŝvebis ĉirkaŭ ni, kaj la tuta Romo kuŝis ĉe niaj piedoj. Nur la steloj mankis, sed la sunsubiro ruĝigis Katedralon de Sankta Petro.



Ĉu estis la muzeo de Vatikano? Duonhoron ni staris en vico por ricevi biletojn. Ĉiuj ŝtataj muzeoj donas senkostan enirbiletojn al pensiuloj. Tamen al la "malriĉa Vatikano" ĉiuj- eĉ la infanoj- devas pagi la plenan prezon. Kroman tutan horon ni promenis tra belegaj salonegoj. Nur la eklezio povas esti tiom riĉa, ni pensas. Sed finfine ni staris en Siksta Kapelo. Kia aspekto! Duonhoron ni ambaŭ silente sidis sub la pentraĵego de Michelangelo kaj malvolonte fine ekiris.

Ĉu estis plej impresoj la antikvaj lokoj? Dum horoj ni promenis tra Forum Romanum kaj la imperiestraj forumoj, ĝuante la spiriton de la klasika antikveco. Tamen la plej antikva monumento, kiu ankoraŭ tute ekzistas, estas Pantheon. Ĝi havas grandegan kupolon, oni nur povas admiri la iamajn konstruantojn.

Kiom da preĝejoj ni admiris! Kompreneble Katedralo de Sankta Petro estas la plej granda, eĉ en la mondo. Tamen Katedralo de Sankta Johano ankoraŭ pli multe impresis nin. Ĝi enhavas multajn orajn mozaikojn, imponajn monumentojn de la apostoloj kaj faman korton kun belegaj antikvaj kolonoj.


Fine ni tute ne forgesu, ke en muzeo Kapitulo ni unuan fojon vidis la originalan amindan "Domoeltiranton", kiun ni ĝis nun konis nur kiel kopion de la Vorlica E-renkontiĝo.

Rekontiĝejoj en Romo kompreneble estas i.a. Hispana Ŝtuparo kaj Fontano de Trevi. Ĉiam ĉeestas multaj turistoj, antaŭ ĉio gajaj gejunuloj. Nokte multaj vidindaĵoj estas lumigataj.

Ni nun finu kaj remusu: Romo validas vojaĝon!

Gekunlaborantoj: Edith kaj Horst Plümecke  
Magdeburg.-

## LA SUNVIRO KAJ LA LUNVIRO



La vivo estis malfacila por la aborigenoj, kiam la mondo estis juna, ĉar, havante nek lumon nek varmon, la popolo devis serĉi sian manĝaĵon en la mallumo, kaj, trovinte ĝin, devis manĝi ĝin kruda.



Iam, Purukupali (pr. Púrukúpali), (la unua viro en la mondo) kaj lia kunulo Japara (pr. ĝapára), kunfrotadis du bastonetojn por vidi, kio okazos, kiam, hazarde, ili ektrovis kiel fari fajron.

Purukupali, ekkomprenante, ke ili estas trovintaj ion, kio venkos la mallumon kaj ankaŭ donos varmon, por ke la aborigenoj povu kuiri manĝaĵon kaj sin varmigi, donis al sia fratino, Wuriupranala (pr. ŭuriúpranala), grandan torĉon, kaj al sia amiko Japara, malpli grandan torĉon, konsilante al ili ke, kio ajn okazos, ili ĉiam gardu tiujn torĉojn brulantaj.

Kiam la krea periodo finiĝis kaj la mitaj homoj estis transformitaj en estaĵojn, vegetaĵojn kaj naturfortojn, Wuriupranala fariĝis la Sunvirino kaj Japara la Lunvirino.

Frumatene, kiam la Sunvirino leviĝas en la oriento kun sia torĉo el flamanta arboŝelo, la aborigenoj foriras el siaj kamploĝejoj por kolekti nutraĵon de la arbaro, ebenaĵo kaj marbordo. Kiam la suno atingas la zeniton, Wuriupranala, ekbruligante fajron por kuiri sian manĝaĵon, tiom varmigas la tagon, ke la aborigenoj retiriĝas en la ombron de la arboj. Dum la posttagmezo ili daŭrigas sian nutraĵkolektadon ĝis la Sunvirino malaperas sub la okcidentan horizonton.

Tiam la Lunvirino, Japara, kun la malpli granda torĉo vojaĝas trans la ĉielon por venki la mallumon de la nokto.

Tradukita de *Alison Edmeades*, Brisbano

Kunlaborantino : *Yenifer R. Bishop*.

# KATIDO

## EN HUNDA AZILEJO

Iun tagon venis al la azilejo ploranta knabineto portante tre malgrasan katidon. Ŝia avino ĉe kiu la knabino pasigis la ferion tute rifuzis akcepti la katidon en la hejmo. Simple diris "forĵetu" ĝin. La bonkora estrino de la azilejo ne scipovas rifuzi helpon al bezonata besto. Restis la problemon ke la katido neis manĝi nur sidis senmova, preskaŭ senviva. Tiam feliĉe aperis Dorota kaj per helpo de injektilo ŝi gutis lakton kun manao al ĝia buŝo. Kun multe da pacienco kaj etaj manĝoj tio sukcesis. Ŝi instruis la estrinon kaj post iom da tempo la katido mem povis leki de telero. Post longa tempo la katido grasiĝis kaj povis aspekti normala kato. Bedaŭrinde montriĝis ke la katido ankaŭ estis preskaŭ blinda reagis nur al movo. Nun la katineto estas belega, ludas kun la hundidoj kaj restas en la azilejo favorata de la estrino kaj la bestkuracisto. La hundamiko de la kato trovis propran mastron kaj translokiĝis. Feliĉan estontecon ni ankaŭ esperas al la katineto.

**Komento de la redaktorino:**

Honoro al homoj dise en la mondo  
kiuj helpas al suferantoj.



Dorota Burchardt - POLLANDO

Folio de Kat-Amikaro

Redaktorino - Ingrid Näsholm

Linderbergsg 4 - S-853 56 Sundsvall

Svedujo

## ÑAN - ARCAJ

Ĝi estas tipa birdo de la nordokcidenta parto de Argentino. Ĝi, ĉe la vesperiĝo, kutimas lopi kaj stari meze de la vojoj timigante tiel la pasantojn per sia krio : "ñan-arcaj, ñan-arcaj" (en la loka lingvo ĝi signifas la vojo estas barita, la vojo estas barita!). Laŭ la kamparaj onidiroj la krietado de tiu birdo anoncas la alvenon de la sekecperiodo.

Pri ĝi oni diras, ke ĝi iam estis homo poste transformita en birdo pro siaj malbonaj agoj. Kiam la hispano invadis la diagitan regnon, norde de Argentino, ili devis forte batali kontraŭ la popolo, kiu horoe defendis sian patrujon.



La hispanoj post longa meditado konkludis, ke la plej efektiva taktiko estus embuski la indiĝenojn kaj por tion sukcesi, necesis subaĉeti la gardiston kaj avanci. Komence la gardisto rifuzis helpi, tamen, fine li gapis antaŭ speguloj kaj ĉevalo, ambaŭ ne konataj de li kaj ofertataj de la hispanoj kiel pagon pro la servoj.

Dank'al la perfidulo la hispanoj malkovris vojon kondukanta al la ĉefurbo mem de la diagitoj. Dumnokte ili eniris, atakis kaj fine la tuta popolo estis masakrita.

La dioj protektantoj de la diagitoj decidis pri ekzemplodona puno al la nura postvivinto, la perfidulo kaj transformis lin en malbelan birdon kun akra krio, kiu ĝis hodiaŭ staras meze de la vojoj klopodante tiel bremsi la alvenon de novaj invadantoj kaj purigi siajn kulpojn.

**Atilio ORELLANA ROJAS**

Argentino.-

## ĈU VI HAVAS BONAN KARAKTERON ?

- 1 - Ĉu vi opinias, ke multaj el viaj konatuloj havas malbonan karakteron ?
- 2 - Ĉu incitas vin la etaj devoj en la ĉiutaga vivo ?
- 3 - Ĉu vi pensas, ke viaj amikoj estas al vi fidelaj ?
- 4 - Ĉu vi malamas, ke nekonataj homoj parolas kun vi ?
- 5 - Ĉu vi piedfrapis hundon aŭ katon ?
- 6 - Ĉu vi ofte prenas medikamentojn ?
- 7 - Ĉu vi ofte ŝanĝas la vendejon, kie vi butikumas ?
- 8 - Kiam vi komprenas, ke vi eraras, ĉu vi daŭre subtenas vian vidpunkton ?
- 9 - Ĉu premas vin la sociaj devoj ?
- 10 - Ĉu vi kapablas atendi pli ol kvin minutojn je rendezvuo, sen montri malpaciencon ?
- 11 - Ĉu vi ofte pensas, ke vi ne havas bonŝancon ?
- 12 - Ĉu vi perdis vian antaŭan graci-linion ?
- 13 - Ĉu vi akceptas kun rido la ŝercojn, al kiuj vi estas ofero ?
- 14 - Ĉu plaĉas al vi la familia vivo ?
- 15 - Ĉu vi estas ofendmemoranta ?
- 16 - Ĉu vi opinias, ke la vetero neniam estas tipa pri la respektiva sesono ?
- 17 - Ĉu vi sentas sin iufoje en malbona humoro ankoraŭ je la matena ellitiĝo ?
- 18 - Ĉu incitas vin la moderna pentrarto ?
- 19 - Ĉu vi povas toleri la frendajn infanojn pli ol unu horo ?

### RIMARKU

Notu per unu punkto je ĉiu "JES" al la demandoj : 3 - 9 - 10 - 13 - 14 - 19

Notu per unu punkto je ĉiu "NE" al la demandoj : 1 - 2 - 4 - 5 - 6 - 7 - 8 - 11 -  
12 - 15 - 16 - 17 - 18 .

Nomburu la punktojn!

Se vi havas pli ol 15 punktojn, vi estas pacema, bonkondata kaj plena je bonvoleco.

Se vi havas inter 8 kaj 15 punktojn, vi ne estas senigita je malperfektecoj, sed tamen, eblas kun vi kunvivi.

Se la rezulto estas sub 8 punktojn, viaj kunvivantoj estas kompatindaj.

El la bulgara tradukis: LILIJA KOLEVA



# Amuzajoj

CISIMO



## PROVOCO

Junulo alproksimiĝas junulinon kaj metas manojn sur ŝiaj okuloj. Poste diras modifit-voĉe:

- Se vi ĝis la tria fojo ne divenos kiu mi estas, mi kisos vin.

Ŝi respondas:

- Bismark, Ŝiler, Adenauer.

Lilija Koleva - Bulgario

## EN LA PARLAMENTO

**La presidanto:** Mi petas, mi petas, sinjoro, vi senĉese insultas. Vi ne devas ofendi.

**La oratoro:** Sed, sinjoro prezidanto, mi ja tute ne ofendas. Mi nur ĝentile pravas al tiu ĉi hunda filo, ke li estas idioto.

Edilberto - Kubo

**Instruisto:** - Kiom longe daŭris ŝtonepoko?

**Lernanto:** - Ĝis kiam finiĝis la ŝtonoj.

Ivan Varjuhin - Rusio

**Unua knabo:** - Ĉu vere la kameloj povas labori dum tuta semajno sen trinkado?

**Dua knabo:** - Certe, kaj kontraŭe mia patro povas trinki dum la tuta semajno sen laborado

Patricia Harkin - Australio

- Ĉu vi scias la kialon, kial la virinoj ne povas profesii je submareco?

- Ĉar ili ne povas havi fermata la buŝon dum longa tempo.

Anonimulo

## PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)  
Sendu al:

CISIMO R. SIMON  
c/ La magdalena nº 26 - 1º D  
C.P.33400 - AVILES  
ASTURIAS - ESPAÑA

## KVINA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO POR LA KULTURO KAJ TURISMO

(sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo)

### Aliĝkondiĉoj

Restado kun kompleta pensio en hotelo "ApartHotel LA RAPITA" (\*\*\*)

Aliĝo al la "Semajno" kostas 3.500 pesetojn.

Gejunuloj ĝis 20 jaroj, senpage.

Ĉambro dulita. "\*\*\*\*\*" 4.200 pesetojn.

Ĉambro unulita. "\*\*\*\*\*" 5.500 pesetojn.

Mi sendas kiel aliĝon..... pesetojn, por restado en hotelo dum..... tagoj ..... pesetojn,  
entute.....pesetojn, aŭ kiel anticipon.....pesetojn

Nomo kaj familiaj nomoj \_\_\_\_\_ Tel.....

Kompleta adreso \_\_\_\_\_

Volu pagi al la jena konto: "Caixa de Pensions" N° 2100-3028-25-2200290294,  
aŭ per poŝta ĝiro al "Internacia Esperanto-Semajno" Font Nova, 32. 08202 SABADELL  
Hispanujo. Tel (93) 7275021

## "KVINA ESPERANTO-SEMAJNO, POR LA KULTURO KAJ TURISMO"

(sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo)

Okazonta en **SANT CARLES DE LA RAPITA**. (Tarragona) Katalunujo-Hispanujo.

DE LA 4-a ĜIS LA 11-a DE OKTOBRO 1997

Nia "Semajnejo" estos la hotelo, "ApartHotel LA RAPITA" (\*\*\*) Plaça Lluís Companys. La hotelo, kiu troviĝas 50 metrojn fronte al la strando, posedas ĉiujn modernajn komfortaĵojn; televidon en ĉiu ĉambro, aeron klimatizigitan, salonon kun kroma lito, telefonon, banĉambro, kuirejon, ampleksajn terasojn, amuzejojn, trinkejojn, parkumejon...

Pliajn informojn vi povas peti al: Hispana Fervoĵista Esperantista Asocio. Apartado 15027.ES-08080  
BARCELONA (Hispanujo) Tel. (93) 7275021.